



Norvega Esperantisto

E S P E R A N T O B L A D E T

N-ro 5/6
1964

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
30-a (37-a) jaro
Monata

Monkolekto al informadfondaĵo

Laŭ propono en la landa kunveno de Norvega Esperantista Ligo en Stavanger dum pentekosto 1963 la estraro de NEL poste starigis finankomisionon kun mandato kolekti monon al informadfondaĵo. La financa komisiono ellaboris laborprogramon — kiun la estraro de NEL aprobis — kies ĉefpunktoj estas:

1. Ellaboro de *Alvoko pri Esperanto* kiel bazo por la monkolekto kaj por veki publikan intereson por Esperanto.
2. Starigo de listoj pri donacontoj al la informadfondaĵo.
Grupo A: Komunumestraroj, kultur-fondaĵoj, legatoj kaj aliaj oficialaj fontoj.
Grupo B: Organizaĵoj, firmaoj, privataj kaj aliaj privataj entreprenoj.
3. Organizado de ellotumadoj en la esperantokluboj.
4. Kronrulado (je kr. 5,00) por la unuopaj membroj pere de *Norvega Esperantisto*.
5. Anoncvarbado por *Norvega Esperantisto* kaj *Esperanto-nytt*.

6. Abonantvarbado inter nemembroj por la samaj 2 ĵurnaloj.

7. Nomi kunlaborantojn por la tuta agado en la diversaj distriktoj de Norvegujo kun unu ĉefhelpanto en ĉiu gubernio.

La membroj de la financa komisiono dividis la taskojn inter si en jena maniero:

John Berggreen (prez.), Brattvollvn. 23 c, Nordstrandshøgda, tlf. 67 99 65:

Punkto 1 — Alvoko pri Esperanto
» 2 — Donacontoj laŭ gr. A.

Johan Matland, Brekkevn. 50, Sauda, tlf. 2588:

Punkto 2 — Donacontoj laŭ gr. B.
» 7 — Kontakto kun la kunlaborantoj.

Alfred Skyberg, Østensjøveien 118 a, Bryn pr. Oslo, tlf. 26 03 44:

Punkto 3 — Ellotumadoj
» 4 — Kronrulado

Kirsten Ek, Otto Ruges vei 66, Røa pr. Oslo, tlf. 24 05 64:

Punkto 5 — Anoncvarbado
» 6 — Abonantvarbado

Interesuloj turnu sin al la persono menciita respondeca por la koncerna tasko speciala.

La celoj de la monokolekto evidentigas el la Alvoko pri Esperanto, kiu estas prezentata por la norvega esperantistaro en tiu ĉi numero de Norvega Esperantisto.

Kun granda ĝojo ni povas anonci ke la Alvoko ricevis komplezan akcepton de multaj bonekonataj esperantistoj kaj de simpatiantoj inter la plej altaj aŭtoritatuloj, kaj ankaŭ de tri registaranoj kaj de mondfamaj norvegoj.

Estas la intenco publikigi la Alvokon en la tuta gazetaro norvega kaj eluzi ĝin en la varbagado por monokolekto al la informadfondaĵo. La esperantokluboj kaj la kunlaborantoj ricevos kvanton de la cirkulero kun la Alvoko meze de Majo.

Nun ni petas la helpon de ĉiuj esperantistoj en Norvegujo kaj speciale de la klubestraroj por ke tiu ĉi grava afero rezultu en tio kion ni esperas: Grandegan sumon al la Informadfondaĵo tiel ke ni havos en Norvegujo firman bazon por estonteca laboro por Esperanto!

Kolektadreso:

Poŝtgirokonto 20 02 80 aŭ
Bankgirokonto 100.000/40.
Norsk Esperanto-Forbunds
opplysningsfond,
Boks 942, Oslo.

Oslo, 28/4—64

La financa komitato de N.E.L.

Jubileoj

La Norda Lúmo, Tromsø,
estis 30-jara la 18-an de majo.

Nordlands Krets av Norsk Esperanto-
forbund

estis 10-jara la 27-an de majo.

Glumarkoj

N.E.L. ricevis grandan kvanton de la glumarko de la kongreso en Hago. Folio de 10 ekzempl. kostas kr. 0,80.

Grava peto

En oktobro 1963 s.roj E.L.M. Wensing (Nederlando), E. Carlén (Svedio) kaj B. Vogelmann (Germanio) oficiale starigis la fondaĵon «Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio», mallonge: EKI. Ĝi kunlaboras kun UEA. — La taskoj de la Instituto estas multaj kaj gravaj. Ili ampleksas i. a. kompiladon de poliglota fakterminaro pri komerco kaj industrio kaj, surbaze de ĝi, verkadon de lernolibro(j) pri komerca korespondado.

Tiu ĉi laboro jam komenciĝis. Unu el la ĉeftraĵoj de la verkata terminaro estas ĝia difino de la komerce teknikaj terminoj kaj nocioj, ĉar antaŭ ĉio necesas ke la vortmaterialo estu normigita. Sur ĉi tiu tre grava tereno, kiun ni apenaŭ kulturis ĝis nun, ni ne povas riski lingvokonfuziĝon. Ni ankaŭ ne povas permesi al ni multobligon de laboro sekve de aktiveco de unuopuloj kiuj verkas kaj eventuale eldon(ig)as sendepende de aliaj Esperantistoj laborantaj por la sama celo. Tial la ĉi-supra Instituto urĝe apelas al ĉiuj Esperantistoj kiuj aktivigas por enkonduko de Esperanto en komeron kaj industrion ne verki memstare aŭ eldoni ion sen antaŭsciigo al ĝi. La Instituto ne petas tion dezirante esti monopol-ema, sed nur ĉar ĝi kredas ĝin necesa el vidpunkto de efikeco kaj celtrafeco. Ni ĉiam agu praktike kaj ekonomie.

Oni povas turni sin al: Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio, Aalsterweg 217, Eindhoven (Nederl.)

F. Munniksma (Amsterdam)

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de redakcio: Boks 942, Oslo
Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—
1/8 p. kr. 19,—

Apogo al Esperanto

Vi trovas en ĉi tiu numero Alvokon pri Esperanto. Ĝi koncernas monokolekton al informfondaĵo. Ĉiu komprenas aŭ devas kompreni la signifon de la informado. Sen informado la tuta Esperanto-movado stagnus. Ni ofte en ĉi tiu loko instigis al informado. Sed *organizita* informado kostas monon, multan monon.

Ni nun petas ĉiujn legantojn partopreni en la 5-kronrulado kaj partoprenigi aliajn, kiuj interesiĝas pri nia lingvo kaj movado, sed kiuj ial ne esperantistiĝis. Tiel vi povas apogi Esperanton.

Vi vidas sub la Alvoko pri Esperanto la nomojn de kelkaj aktivaj esperantistoj, kaj sub tiuj la nomojn de kelkaj simpatiantoj. Inter la nomoj vi trovas tri membrojn de la norvega registaro: Aase Bjerkholt, Halvard Lange kaj Trygve Lie; du membrojn de la norvega parlamento: Kjell Bondevik kaj Helge Seip, la rektoron de la Universitato en Oslo, prof. d-ro Hans Vogt kaj kvar profesorojn, Birger Bergersen, estinta ministro pri Instruado kaj Eklezio, Ingebrigt Johansson, Olav Midttun kaj Olav Reiersøl; la urbestron de Oslo, Brynjulf Bull; la prezidanton de la Landorganizo de la norvega

laboristaro Konrad Nordahl; mondfaman esploriston Thor Heyerdahl; nian nun plej grandan romanverkiston d-ro Johan Falkberget.

La nomoj sub la Alvoko pri Esperanto estas garantio pri la seriozeco kaj la graveco de la afero.

Sciigoj de N.E.L.

Kursoj dum la aŭtuno. Kiel montras la jarraporto de N.E.L. (vidu en la pasinta numero), la membronombro ne kreskis, sed kontraŭe daŭre montras tendencan iomete malkreski. La kaŭzo ne estas eksterordinare multnombra ekzigado, sed tro malgranda kursagado, tiel ke la aliĝado de novaj membroj ne sufiĉas por kompensi la naturan perdadon. *Tio ne povas daŭri!* La Estraro de N.E.L. tial substrekas ke estas *nepre necese* ke senescepte ĉiuj kluboj kaj laŭeble multaj el la rektaj membroj starigos kursojn dum la venonta aŭtuno. Nur per kursaraĝoj oni povas kreskigi la membraron de la kluboj kaj fondi klubojn en novaj lokoj. Utiligu la intereson, kiu evidente ekzistas, aŭ estas krebbla, inter la gejunuloj. N.E.L. estas preta helpi per kursmaterialo kaj konsiloj. Kie neniu loka samideano povas gvidi kurson, oni klopodu fondi studrondon por komencantoj per la koresponda kurso. Krome oni klopodu igi lokan gazeton publikigi la gazetkurson (skribu al N.E.L. pri plano kaj provleciono). Sed komencu *jam nun* prepari la aŭtunajn kursojn!

Taskctabelo por la kluboj. —

Junio: La estraro planas la aŭtunan laboron kaj precipe de-

cidas detalojn rilate la aŭtunajn kursojn.

Julio: Antaŭ la 15a la sekretario sendas al N.E.L. (kun kopio al la distrikto) raporton pri la 2a jarkvarono kun studraporto pri la 1a jarduono dorsflanke (blankedo A 10/E1).

Aŭgusto: Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La estraro zorgas pri kursejo kaj kurspropagandiloj.

Septembro: La kursoj komenciĝas. La studgvidanto refunkciigas la studrondojn kaj fondas novajn. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

5-kronrulado al la Informfondaĵo de N.E.L.

Jenaj donacis kronojn 5,00 kaj petas ĉiujn esperantistojn en Norvegujo fari same (tiuj kiuj volas doni pli ol kr. 5,00, sendu la alian donacon — krom kr. 5,00 — rekte al poŝtĝirokto. 20 02 80 aŭ bankĝirokto. 100.000/40):

Listo 1: John Berggreen
Otto Koren
Ellen Tangen
Brynhild Østmo
Aslaug Refsing
Otto Prytz
Harda Danielsen
Kirsten Ek
Rolf Bugge-Paulsen
Alfred Skyberg
Kjell Gustavsen
Astrid Mansrud
Carl Støp-Bowitz
Else Bugge-Paulsen
Nanna Fridrichsen
Signe Haug
Lovise Bø
Tharald Dybing
Ruth Herlofson

Karen Berge 75-jara

Nia ĉies fidela, fervora veteranino en Sauda, s-ino Karen Berge, fariĝis 75-jara la 15-an de majo 1964. — Ŝi eklernis Esperanton en la kurso de O. T. Nicolaisen en 1937, kaj tuj membriĝis al Sauda Esperantoklubb kiu fondiĝis post tiu kursofino.

La Esperantomovado en Sauda ŝuldas al ŝi sinceran dankon pro ŝia vera sindono al nia komuna ideo. Esperanto estas granda parto de ŝia vivo, kaj dum tempoj malhelaj ŝi estis por ni instigo al daŭra laboro por nia kara Esperanto.

Akceptu niajn korajn gratulojn okaze de la tago via!

—li.

*


Karsten Langsholt 50-jara

La 20-an de majo Karsten Langsholt, Sarpsborg, estis 50-jara, kaj ricevis de sia klubo *La Urso* la tradician flolvazon kun verda stelo. Samtempe li povis festi sian 30-jaran jubileon kiel esperantisto.

Jam en 1935 li fondis Esperanto-klubon en Sarpsborg, kaj estis ties unua prezidanto. Li gvidis kursojn, faris paroladojn kaj verkis gazetajn artikolojn. En la jaroj 1953-58 li estis prezidanto de la Orienta Distrikto de NEL. Dum multaj jaroj li estas revizoro de *La Urso*, kaj nun estas redaktoro de la Norvega Kroniko en nia gazeto. Por sia fidela laboro li ricevis en 1955 la gradon de Kavaliro 2 de la ordeno de NEL, Pro Merito.

Kåre Myhr
Bjørn Ottesen
Edith Stray
Otlu Sørensen
Elna Matland
Johan Matland
Johan Hammond Rosbach
Entute 26.

På
norsk



Nye forslag om fredsprisen
til Esperanto

I følge Esperanto-pressen er det også i år sendt mange forslag til Stortingets Nobelkomité om å gi årets fredspris til verdensforbundet Universala Esperanto-Asocio. Forslagene kommer fra fremstående personligheter som innehar slike stillinger at de er berettiget til å komme med forslag om kandidater til fredsprisen.

Forslagene begrunnes blant annet med forbundets resultatrike arbeid for å fremme gjensidig forståelse mellom nasjonene.

Esperanto-undervisning i Brasil

En ny lov om undervisning i Brasil har innført Esperanto som valgfritt fag i alle realskoler. Det berømte Copacabana-instituttet i Rio de Janeiro tok straks faget opp i to klasser. Elevene kunne fritt bestemme om de ville være med i Esperanto-klassene, men etter at klassene var oppsatt, var Esperanto obligatorisk fag for alle elevene i de to klasser. Skolen ønsker at korrespondanse med utenlandske esperantister skal inngå i undervisningen, og oppfordrer skoleungdom til å skrive til: Institut Copacabana, rua 5 de Julho 254, Rio de Janeiro.

Første norske Esperanto-gate

I mange land støter man ofte på gater og plasser som har fått navn etter Esperanto. Bare i Frankrike er det over førti slike gater og plasser; i Skandinavia har Esperanto-platsen i Göteborg vært alene om tilknytning til det internasjonale språket.

Nå kommer Norge etter. Formann-

skapet i Elverum har nettopp gjort vedtak om å gi en gate, vei el. plass i byen navn etter Esperanto. Navnedåpen skal foregå i mai neste år i forbindelse med jernbanefolkenes internasjonale Esperanto-kongress på Hamar.

Ny Oslo-brosjyre på Esperanto

Reisetrafikkforeningen for Oslo og Omegn har i flere år benyttet Esperanto i sin turistinformasjon utenlands, både i trykksaker og i filmer. I år har den gitt ut en ny brosjyre på Esperanto, som blant annet blir distribuert gjennom verdensforbundet Universala Esperanto-Asocio og tilsluttede landsforbund.

Eksemplarene av den siste Oslo-filmen med Esperanto-tekst er stadig på rundtur fra land til land og er et velkomment innslag i Esperanto-foreningenes møteprogrammer.

17-a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia 1964

La ĉijara internacia kongreso de K.E.L.I. okazos en *Lunteren, Nederlando*, de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto, do tuj antaŭ la Universala Kongreso de Esperanto, kiu ankaŭ okazos en Nederlando. Sed ĉar la Univ. Kongreso okazos en Den Haag, ĉe la maro, ni elektis Kongresejon meze en la lando, inter arbaroj kaj erikejoj. — La temo de nia kongreso estas: «Paco de Dio kaj surtera paco».

Ankaŭ ekskursoj okazos.

La kotizo por partopreno de la kongreso kun plena pensio sumiĝas nur al 121 guldenoj. Studentoj kaj lernantoj sen propraj enspezoj havos speciale favoran kotizon.

Informojn donos al vi:

F-ino Tini Putto
Bennekompweg 20
EDE (Gld.), Nederlando.

OPPROP OM ESPERANTO

Etterat UNESCOs generalkonferanse i Montevideo i 1954 uttalte sin anerkjennelse av Esperantos betydning for internasjonalt samarbeid, har esperantobevegelsen skutt vekst i alle verdensdeler.

Esperanto er nå i daglig bruk jorden over i det praktiske livs tjeneste. Det benyttes i internasjonal korrespondanse og i reisetraffikk, på kongresser, i faglitteratur og skjønnlitteratur, og en kan høre det daglig i radio.

Det utkommer stadig flere bøker på Esperanto, originale og oversatte verker, og det utgis et stort antall aviser og tidsskrifter på dette språk. Esperanto blir innført i flere og flere skoler jorden over og kan med fordel undervises som det første fremmede språk i folkeskolen på grunn av sin logiske oppbygging og fordi det er så lett å lære.

Verdensforbundet for Esperanto har et nett av «konsuler» (over 3000 i 64 land), og ved deres hjelp kan man komme frem over alt.

En henstilling til F.N. om bruk av Esperanto samlet 17 millioner underskrifter.

I vår tid er det mer enn noensinne nødvendig med kontakt folkene imellom. Dette gjelder ikke minst ungdommen, som også i stadig økende grad tar Esperanto i sin tjeneste, bl.a. ved egne internasjonale Esperanto-ungdomskongresser og leirer.

Kort sagt: *Esperanto trenger seg frem i verden fordi verden trenger et middel til forståelse og samarbeid over landegrensene.*

Også i Norge vinner Esperanto terreng. Norsk Esperanto-Forbund har nå lokalavdelinger og medlemmer over hele landet. Men virksomheten koster penger, selv om alt arbeid i

esperantobevegelsen i Norge utføres ved ulønnede tillitsverv. Norske esperantister har ydet store personlige offer i form av arbeid og pengegaver til fremme av Esperanto-saken, men for å komme videre med de store oppgaver som forestår, er det nå påkrevet med økonomisk støtte fra en større krets.

Norsk Esperanto-Forbund har derfor oppnevnt nedenstående finanskomité, som tillater seg å sende ut dette opprop om støtte, såvel økonomisk som moralsk, for esperantosaken.

Vi søker om

pengegaver, små og store, annonser til våre organer (bl. a. Esperantobladet som sendes jorden over i abonnement og i bytte med utenlandske tidsskrifter på Esp-o), abonnenter til norske og utenlandske Esperanto-tidsskrifter, aktive el. passive støttemedlemmer.

Formålet for innsamlingen og støt-teaksjonen er:

1. Å sette Norsk Esperanto-Forbund økonomisk bedre istand til å fremme den idé om internasjonal forståelse gjennom et nøytralt språk som er fremsatt av dr. L. Zamenhof, grunnleggeren av Esperanto.
2. Å øke kjennskapet til Norge i utlandet ved hjelp av det internasjonale språket Esperanto.

Tiltak som tenkes iverksatt for å nå nevnte formål:

1. Oversettelse og utgivelse av norsk litteratur på Esperanto,
2. Utgivelse og distribuering av oversikter på Esperanto vedrørende norsk næringsliv, landbruk, industri, skipsfart, handel, vitenskap.
3. Informasjon om Norge i internasjonale

nal esperantopresse og utgivelse av en publikasjon: NYHETER OM NORGE på Esperanto,

4. Arrangement av utstillinger og konferanser i utlandet om Norge av turistmessig, næringspolitisk og kulturell betydning,
5. Arrangere i Norge internasjonale esperantostevner for ungdom,
6. Yte støtte til norsk ungdoms deltagelse i internasjonale Esperanto-kongresser og ungdomsstevner i utlandet,
7. Igangsette kurser i Esperanto for lærere og ungdomsledere.

Alle innkomne midler vil bli samlet i et OPPLYSNINGSFOND under full kontroll av en statsaut. revisor.

Erkjennelse for riktig mottagelse av gavene vil bli gitt på nummererte kvitteringer.

Innsamlingsadresse:

Norsk Esperanto-Forbunds opplysningsfond,
Postboks 942, Oslo,
Postgiro-konto: 20 02 80
Bankgiro-konto: 100.000/40.

Oslo i mai 1964

I Norsk Esperanto-Forbunds finanskomité:

John Berggreen *Kirsten Ek* *Johan Matland* *Alfred Skyberg*
(formann)

Anbefales på det beste av oss som aktive esperantister:

<i>Nils Arvesen</i> Bankdirektør	<i>Rolf Bugge-Paulsen</i> Inf.kaptein	<i>Eyvind Ek</i> Overlege
<i>Hans Fløgstad</i> Biblioteksjef	<i>Odd Frøner</i> Sogneprest	<i>Sverre M. Halbo</i> H.r.advokat
<i>Fin Hole</i> Tannlege	<i>Arne Høgseth</i> Disponent	<i>Ingebrigt Johansson</i> Professor
<i>Synnøve Kloumann</i> Husmor	<i>Astrid Mansrud</i> Lærerinne	<i>Birger Nordstrand</i> Skoleinspektør
<i>Knut E. Norrvall</i> Arkitekt MNAL	<i>Ragnvald Overvoll</i> Sjefssekretær	<i>Otto Prytz</i> Stud. philol.
<i>Olav Reiersøl</i> Professor	<i>Hans A. Rosbach</i> Kallskapellan	<i>Johan Hammond Rosbach</i> Lektor
<i>Olav Rygg</i> Sivilingeniør	<i>Jens Schjerve</i> Cand. real.	<i>C. Støp-Bowitz</i> Konservator

Tiltredes av oss som følger sympati for esperantobevegelsen med oppfordring til støtte for saken:

<i>Birger Bergersen</i>	<i>Aase Bjerkholt</i>	<i>Kjell Bondevik</i>	<i>Brynjulf Bull</i>
<i>Johan Falkberget</i>	<i>Erling Hagen</i>	<i>Thor Heyerdahl</i>	<i>Alfhild Hovdan</i>
<i>Halvard Lange</i>	<i>Trygve Lie</i>	<i>Olav Midttun</i>	<i>Odd Nansen</i>
<i>Konrad Nordahl</i>	<i>Gunnar Raabe</i>	<i>Helge Seip</i>	<i>Geburg Aasland</i>

VINCAS PIETARIS:

Sorto de malnoblulo

El la litova tradukis Kl. Naudzius (daŭr.)

Li ekvipis la ĉevalojn, tamen tiuj ĉi, pene ektirinte unu fojon kaj alian, ree haltis. Denove li ekbatis la ĉevalojn, tamen mem jam ne povis detiri la okulojn for de la linsekigejeto: al li ŝajnis, ke el tie kvazaŭ venas ĝemanta voĉo. La pordo, superŝutita per neĝo, la fenestroj, blankaj pro prujno, kvazaŭ certigis, ke en ĝi neniu loĝas, tamen li aŭdis ĝemi, klare aŭdis. Eĉ la haroj stariĝis sur la kapo. Li dezirus preterveturi, tamen la ĉevaloj ne iras, kaj lin mem kvazaŭ iu tiras en la linsekigejeton.

Ĉi-tempe ree iu ekĝemis tie. Farinte sur si krucsignon, Jurgela desaltis de la glitveturilo kaj ekvadis tra la neĝo al la linsekigejo. Li malfermis la enirpordon, enbruligis spliteton kaj, trovinte la ĉambropordon, eniris.

En la malvarma linsekigejo staris la lito, apud ĝi pendis la lulilo. Sur la lulilo vidiĝis ĉifonoj, kaj sur la lito kuŝis preskaŭ senvesta homulo.

— Ve! ve! ĝemis ĝi. Kun malfermegegitaj okuloj rigardis Jurgela kaj ne povis kompreni, kio estus ĉi tie. Tiel frostas, do en la ne hejtita linsekigejeto — preskaŭ tute nuda homino.

— Ve! ve! ekĝemis denove. — Ve, ve! Obeigu la ĉevalojn! Hej, obeigu. . . ili surpaŝos, surpaŝos sur la kapon, sur la brakojn. . .

Jurgela ektuŝis la kapon. La kapo de l' homino brulis. La piedoj estis kvazaŭ glacio.

Denove li bruligis kenon kaj ekvidis en la lulilo sub la ĉifonoj kuŝantan infanon. Li ektuŝis lin per la mano. La infano estis morta — malvarma, kiel glacio, kadavro.

— Ve! ve! ĉu ne ekzistas Dio! Dio ekzistas! sin aŭdigis la deliranta virino. — Ve! ve! . . . denove ŝi ekĝemis.

Rememoris tiun ĉi kriadon Jurgela. Kaj la haroj stariĝis sur lia kapo. Antaŭ li sur la lito kuŝis Bevuogis-edzino kaj deliris de neniu flegata, en la lulilo kuŝis kadavro de l' infano. . . Kaj ĉio ĉi tio estas lia faritaĵo.

Kun rapideco li ĵetis sin al la pordo por palpetrovi ĝin: en mallumo apenaŭ trafis. Elirinte tra la pordo li ekcerbumis — eble li devus ĝin fermite ligi, por ke la deliranta homino ne povu foriri, tamen, havante nenion per kio li povus tion fari, ĉi penson li forigis. Tra la enirpordo li ekrigardis al la ĉevaloj — tiuj staris en la neĝamaso.

— Kion li faru? li demandis sin mem kaj, returninte la ĉevalojn, forgalopis, kvazaŭ li estus ĉasata de la malbona spirito. . .

Post ioma horo li vekiĝis el la sveno kaj konsciiĝis, ke li sin trovas sur la propra korto. Li kuŝas sur la glitveturilo, la ĉevaloj staras ĉe la ŝirmtegmento. La vetero estas malvarma, tamen li mizerulo kuŝas, varmiĝinta kiel muso, sur la glitveturilo.

Jurgela krucsignis sin kaj . . . dimanĉe iris al konfeso. Tamen ankaŭ la konfeso nenion helpis. Post kelkaj tagoj, malsobra revenante hejmen, li renkontis Bevuogis'on, kaj ĉi tiu longe pelis lin tra kampoj, dezirante kuratingi kaj sufokmortigi. Sed kiam Jurgela ekkriegis kaj vekiĝis, do anstataŭ Bevuogis'on. . . li ĉirkaŭbrake tenis la kuĉerbenkon de l' glitveturileteto kaj premis ĝin. La ĉevaloj malrapide paŝis alhejmen.

Jurgela sciiĝis, ke ie, ĉu ne en Plunge-urbeto, ekzistas iu germana sorĉisto, kiu scipovas kuraci suferantajn pro fantomoj. Post naŭ tagoj

de kuracado li gaja revenis hejmen, restiginte ĉe la sorĉisto la fantomojn kaj ankaŭ konsiderindan monsumon. Tamen nelonge li ĝojis. Apenaŭ li denove malsobriĝis, jen ree komencis al li ŝajnevidiĝi Bevuogis. . .

Alvenis la printempo. La glacioj ankoraŭ kovris la riverojn, sed la riveroj jam komencis ŝveli, tie kaj ĉi tie troviĝis glacitruoj. Jurgela malsobra venis hejmen; pasante apud la rivero li veturatingis almozulon.

— Kunveturigi min, estu kompatema! ekpetis la homineto per tremanta voĉo.

Al Jurgela ekŝajnis, ke ŝi estas Bevuogis-edzino. Li ekakcelis la ĉevalojn per krio kaj vipobatoj.

— Kunveturigu! sonis en la oreloj de Jurgela kaj ŝajnis al li, ke longa malvarma glacia mano de Bevuogis-edzino kaptis lin je la kolo por sufoki. Jen li sentas tiun ĉi manon sur sia kolo, kvankam efektive ĝi estis nur salikvergo, kiu trastrekis.

— Helpu! ekkriegis Jurgela kaj el tuta forto vipfrapis la ĉevalojn, malbone ilin gvidante per la malsobraj manoj. La ĉevaloj ekgalopis, tamen ne je la vojo, sed jen tra herbejo, salikaro kaj defalis — kun la glitveturileteto, kun Jurgela — de kruta bordo en glacitruon.

La edzino de Jurgela ne ĝisatendis lin reveni kaj iris por serĉi. La morgaŭan tagon ŝi trovis la ĉevalojn, trovis la frakasitan glitveturileteton en la riverborda salikaro. Tamen Jurgela mem eĉ ĝis hodiaŭ ne troveblas.

FINO

Korespondu!

Kontraŭ ĉasistoinsignoj mi sendas ilustritan Esp.revuon, pm., insignojn, kolorajn bk. pri Budapeŝt aŭ pri belartoj laŭ via deziro. Adreso:

Georgo Halász, V.K. Esperanto Kör, Gyömrői—u. 128, Budapeŝt, X. Hungarujo.

Postmarkoj povas esti utilaj!

Dum kelkaj jaroj aperis en la esperanta gazetaro informo de P. Zacho, Kopenhago, ke li akceptas uzitajn poŝtmarkojn en la nomo de UEA.

Li mem faras la tutan laboron koncerne la poŝtmarkojn, tiel ke ili povas esti venditaj kaj transformiĝi en reala mono por la asocio. Legantoj de la organoj de UEA ankaŭ povas legi ke la monsumo ĉiujare estas konsiderinda sumo, tute ne bagatela. Mi mem antaŭ kelka tempo ensendis koverton al s-ro Zacho kun uzitaj poŝtmarkoj ĉiuspecaj. Mi rivecis dankan cirkuleron kun sinceraj salutoj.


Sciante ke sendaĵo de uzitaj poŝtmarkoj vere povas helpi al nia movado, mi admonas al vi ĉiuj ne forĵetu la poŝtmarkojn, kolektu ilin por posta forsendo al Kopenhago. Ankaŭ en la esperanta movado validas la proverbo: «Amo faras ion, mono ĉion!»

Elna Matland.

Adreso de s-ro Zacho: Randbølvej 4, Kopenhago F, Danlando.

PETU PROSPEKTON PRI

ĈE I.T.C. - GEB. 114
SCHIPHOL NEDERLAND



El niaj kolegoj

Sur la tablo antaŭ mi kuŝas du novaj gazetoj, el ambaŭ la n-roj 1 kaj 2. Temas pri la junulara gazeto «Kontakto», kaj alia, kiu havas la belan nomon «Ripozoj».

Ĉu mi rajtas en tiu ĉi rubriko kvazaŭ rezenci la gazetojn? Tiukaze mi unue volas iom kritiki «Kontakton». Kial tiu nomo, jam uzita de multaj pli-mal-pli legeblaj multobligitaj paperoj de esperanto-grupoj aŭ asociaj etoj? Al junulara gazeto oni trovu decan, flamantan, kaptigan nomon. Kaj kial la du kajeroj havas ĉiu sian formaton. Se iu trovas la gazeton sufiĉe bona por konservado, tio nebligas bindigon, malhelpas al alia kontentiga konservado.

La unua numero kvazaŭ portas la stampon de nia revuo Esperanto. La dua jam pli trovis sian propran karakteron. Eble oni diru, ke la unua n-ro ankoraŭ nur estas infano, dum la dua atingis la junulecon, al kiu ĝi celas.

«Ni volas per «Kontakto» doni al TEJO karakteron, kaj montri ke ĝi ja ne estas inerta kaj senviva organizo. Ni celas ne simple liveri al vi en «Kontakto» nur ankoraŭ alian novaĵfoliaron aŭ anoncaron, sed veran gazeton, kies enhavo pritraktu ankaŭ tiujn problemojn, kulturajn kaj sociajn, kiuj tuŝas la junularon, kaj tiujn apartajn interesojn kiujn havas gejunuloj.»

Jam la unua n-ro volas atingi tiun celon, kion montras i. a. artikolo de K. Chaplin: «Needzinaj Patrinoj. — Usona Socia Problemo»

«Dum la 'Viktoria epoko' publika diskutado pri seksaj moroj estis tabua, kaj junulinoj havis tre malmultan liberecon. Nun ŝajne la kutimoj atingis la alian ekstremaĵon.»

La aŭtorino ne provas doni solvojn de la problemo. Ŝi nur montras, konstataj kaj ankaŭ substrekas, ke

«nuntempe estas pli da demandoj ol respondoj en tiu ĉi esplorkampo. la fakto, ke oni eĉ faras la demandojn estas paŝo laŭ ĝusta direkto.»

La dua n-ro i. a. pritraktas alian socian demandon: «5 000 000 da francaj gejunuloj akuzas: Ĉiuj kontraŭas nin.» — artikolo presita per tre malgrandaj literoj, kvankam supre estas 7,5 cm libera marĝeno! Mi tial kredas ke la multilustrita artikolo pri Cicely Tyson, usonanino kun tempesta kariero, estos multe pli legata, kvankam la unua estas la senkompare plej grava!

*

Al ferioj instigas la gazeto «Ripozoj» per belegaj bildoj, koloraj kaj nigro/blankaj, kaj artikoloj pri Bulgarujo. «Dumonata revuo, aperanta en Esperanto, rusa, germana, angla kaj franca lingvoj.» Ili « vendas » sian landon al la turistoj:

«Ĉiu sezono en Bulgario havas sian ĉarmon. En tiu ĉi lando de kontrastaj belecoj estas troveblaj: Pitoreskaj montaraj kaj marbordaj somerrestadejoj, centoj da mineralakvaj fontoj kaj ĉiuloke la fama bulgara gastamo»

Kial ni, norvegoj, ne faras ion similan? Tion mi diris pli frue, tion mi diros denove!

Haro.

RECENZOJ

Granda kaj grava romano

Raymond Schwartz: Kiel akvo de l'rivero. STAFETO: Belliteratura Serio 19—20 (duobla volumo), J. Régulo, La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1963. 488 paĝoj. Prezo: broŝ. 3,00, tolbindita 3,80 us. dolaroj.

Oni ofte legas plendojn pri tio, ke la leganta publiko ne estas sufiĉe aĉetema kaj legema en Esperantujo. Tio povas esti. Certe tre multaj esperantistoj ne legas, ne pruntas, ne aĉetas Esperantan literaturon. Tamen la Esperantaj aŭtoroj kaj eldonejoj verkas kaj eldonas. La Esperanta literaturo ne estas malforta. Kelkaj aŭtoroj eĉ pli ol unufoje verkas kaj eldonigas libron. La proverbo ja diras ke ĉiu povas verki unu libron — al kio Somerset Maugham seke rimarkigas, ke la proverbo nenion diras pri dua libro . . .

Raymond Schwartz verkis ne nur la duan. Mi citu ankoraŭ Somerset Maugham: «La amatoro estas saĝa, se li ne provas ankoraŭ unu fojon. Lia dua libro certe estos senvalora. Ĉar unu el la grandaj diferencoj inter la amatoro kaj la profesia aŭtoro estas, ke la lastenomita havas la kapablon progresi.»

Schwartz montris la kapablon progresi. Kvankam pluraj el liaj libroj apartenas al la atendindaj, ne povas esti dubo, ke la romano «Kiel akvo de l'rivero» estas lia ĉefverko ĝis nun.

Superpezas en la Esperanta literaturo la poezio, kaj ankaŭ la novelo de nia lingvo estas riĉa branĉo. La romanoj ankoraŭ ne estas multaj, kio estas plia kaŭzo por bonvenigi ĉi tiun libron.

«Kiel akvo de l'rivero» ne apartenas al la malgrandaj romanoj, ĝi ne estas nura novelo plilongigita aŭ plilarĝigita. Ĝi estas granda romano,

dika, riĉa, larĝa: dika libro, riĉa enhavo, larĝa agado. La aŭtoro pentris *con amore* pejzaĝojn, homojn, morojn kaj eventojn en landparto, kiun li evidente ĝisfunde konas. Lia detala priskribado ofte memorigas pri la plej bonaj priskriboj en franca kaj norvega romanliteraturo, jen Balzac, jen Hugo, jen Falkberget, jen Kiel-land. Kun granda intereso oni legas eĉ la ĉiutagajn detalojn, kaj la legado estas facila, pro la bonega lingvaĵo. Tamen la unua duono de la libro estas multe pli forta ol la dua.

La riĉa fantazio de Schwartz scias krei personojn kaj eventojn (eble laŭ modeloj de li konataj) — kaj sukajn, elvokajn esprimojn. Jen nur kelkaj: «estis jam ekfraŭlinoj», «per afabla rideto aŭfiŝis bonvolon kaj simpation», «la kaporaloj alfaŭkas», «lia kostumo aspektis laca», «ŝtuparo krute vojis al la supera etaĝo».

Francismoj ja estas pluraj. «Vi poste jungos la Brunette al la kaleŝo kaj veturos al la stacidomo» (uzo de simpla futuro kun signifo de imperativo). «Kion vi volas?» (Que voulez-vous?) (p. 53) estas esprimo tute nekomprenebla por ekz. norvego en tiu signifo. «Ili aranĝis kaŝkaŝpartiojn» (p. 154) — rekta kopio de la franca cache-cache (kaŝludo). — «Antaŭ la ludilvendejoj Hugo kaj Lotte emis malfruiĝi»: «malfruiĝi» redonas la francan «retarder», sed ne bone taŭgas por redoni ĝermanlingvan nocion pri «resti, staradi, k.s.s.». — «La patro, mildan rideton ĉirkaŭ la buŝo, glatigis sian barbon» kun absoluta akuzativo, kiu ja ne ĝenas, nek estas malĝusta, sed forte sentigas la francan.

Tiom nur pro la recenzista devo. Sed la ĉefa devo de recenzanto pri ĉi tiu romano estas konstati, ke ĝi valore riĉigas nian originalon, kaj esprimi la esperon pri pliaj romanoj el la plumo de Raymond Schwartz.

Johan Hammond Rosbach.

HIDEO YAGI MORTIS

Okayama (IGS/580). La sesan de majo 1964 mortis elstara medicinisto kaj laborinto por la Internacia lingvo, profesoro d-ro Hideo Yagi. Li atingis grandan eminentecon en la fakoj de ginekologio kaj akuŝa scienco, kaj krome prezidis dum la pasintaj du jaroj la Universalan Esperanto-Asociacion.

Profesoro Yagi estis simpatia, ĉiame ĝentila sciencisto, plene dediĉita al la intereso de la medicino, kiel ankaŭ al la progresigo de la Internacia lingvo Esperanto, por kio li laboradis ekde siaj studentaj jaroj. Nur antaŭ kelkaj monatoj, neatendita apopleksio devigis lin haltigi siajn laborojn kiel direktoro de la Kawasaki Kancera Instituto en Okayama, kaj demisii el la prezidanteco de Universala Esperanto-Asocio. Tiel la sorto malpermesis al li, la unua azia prezidanto en la historio de Universala Esperanto-Asocio, vidi la realiĝon de la unua Universala Kongreso de Esp.-o sur azia teritorio, kiu okazos en Tokio en la somero de 1965, kaj por kiu li entuziasme pledis jam de pluraj jaroj.

RECENZOJ

De kie venis la malakordoj? — Respondo al k-doĵ Thorez kaj aliaj. Eld.: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1963. 35 p., broŝ.

MOJCA ETULINO. Eldonis Mladinska knjiga kaj Eldona sekcio de Slovena Esperanto-ligo. Ilustrita libreto el la serio «Abeleto», kiu enhavas Karintian popolan rakonton, bele ilustritan de Maria Kraljeva. Tiu ĉi libro estas la 54a en la serio kaj bonege taŭgas kiel legaĵo por infanoj kaj junaj Esperantistoj.

Hideo Yagi naskiĝis proksime de Osaka la 18-an de aŭgusto 1899, kaj eklernis Esperanton en 1917. Kiel studento li fondis Esperanto-klubon en Kioto, kaj fondis kaj redaktis ĝian ilustritan revuon «Libero». Dum li ankoraŭ studis medicinon li verkis kaj eldonigis Japano-Esperantan Vortaron (kun aliaj), Kurslibron de Esperanto, kaj japanlingvan broŝuron pri la lingva problemo. En postaj jaroj li publikigis aron da originalaj medicinaj artikoloj en la Internacia Lingvo. En 1934 li fariĝis Profesoro de Ginekologio kaj Akuŝologio en la Universitato de Okayama, kaj restis en tiu funkcio dum 28 jaroj. Jam en 1937 li partoprenis en la Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio, kaj tie prelegis. En la lastaj jaroj li fariĝis vicprezidanto de la Internacia Federacio de Ginekologio kaj Akuŝologio, prez. de la Azia Ginekologia Asocio, rektoro de la Universitato de Okayama, kaj prezidanto de Universala Esperanto-Asocio. — Lia morto signifas grandan perdon kaj por la medicino kaj por la Internacia lingvo.

HOMO KAJ KOSMO. Populara sciencia revuo. Eldonejo: Astronomia Observatorio de la Kroata natursciencia societo, Zagreb, Jugoslavio. Aperas regule kvaronjare. — Jara abono: 20 steloj (proks. 10 n. kr.)

Kelkaj titoloj de la artikoloj en n.ro 3: La universo — eksplodanta? La dimensioj de la tero laŭ Erastosthenes. Ĉu el la kosmo minacas «La danĝero»? Interesaĵoj kaj kuriozaĵoj el la Naturo. Novaĵoj el Primoŝteno, la adriatika somerumejo, loko kie Esperantistoj ferias, banas sin en la mar-lazuro, barkveturas, velas kaj ĝojas. Interesa, bone redaktita revuo.

H. Fr.

Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

JARKUNVENOJ

«Mara Vento», Haugesund,

okazigis sian *jarkunvenon* 6/2. — La jarraporton laŭtlegis la sekretario kaj la jarbilancon la kasisto. Ambaŭ raportojn oni aprobis sen rimarkigoj.

Estis bona agad-jaro kun relative granda aktiveco. La klubo estis reprezentata en la jarkunveno de NEL kaj en la UK en Sofio. Funkciis daŭriga studrondo. Nombro da geklubanoj leterkontaktis kun alialandaj samideanoj.

La elektoj rezultis jene: O. Thormodsen, prez. (reel.), Betty Clausen, vizprez. (nova), Johs. Sortland, sekr. (reel.), O. J. Rønnevig, kasisto (reel.) kaj Mathias Skree (reel.). Anstataŭantoj Solveig Mathiesen kaj Magnus Kallevik. Revizoroj: Ingvald Johannessen kaj Sigmund Blikshavn.

«La Norda Lumo», Tromsø,

7/4 okazis *jarkunveno*, kaj kiel prezidanto estis elektata instruisto H. Olsen, kasisto Olav Olsen (reel.). 28/4 la anoj renkontiĝis en la hejmo de la nova prezidanto, kie denove la grava temo «Kiel» estis pritraktata.

Bodø Esperantoklubo

okazigis ĵus *jarkunvenon*. La jarraporto montris ke tiu laborjaro estis relative bona. — Du el la klubanoj partoprenis en la Universala Esperantokongreso pasintan jaron. Dum la kunvenoj filmoj kaj paroladoj okazis. Ĉiuj membroj partoprenis en la jarkunveno por Nordlanda Distrikto kiu kunvenis en Bodø. Unu festkunveno kaj dek ordinaraĵoj kunvenoj okazigis. Jarraporto kaj kasraporto unuvoĉe estis aprobataj. La malnovaj estraranoj estis reelektitaj: Prezid-

anto Enevald Mārli, vicprez. Bjørn Fygle, kasisto Egil Ellingsen, sekretario Leif Hansen. Estraranoj: Anna Chris. Nilsen kaj Egil Hunstad. — Delegitoj: Bjørn Fygle kaj E. Mārli.

ORDINARAJ KUNVENOJ

Klubo Esperantista en Oslo

kunvenis 2/4. La prez. menciis ke estas la intenco aranĝi dek-minutan lingvan instruadon en nova maniero kaj prezenti novan programserion: «Ĉu vi scias...?». Kiel novajn temojn por la prelegoj li menciis:

«Mia plej interesa travivaĵo kiel esperantisto»

«Interesaj homoj kiujn mi renkontis»

«Memoroj el mia infana vivo»

«Mia alia intereso krom Esperanto»

«Kiel mi fariĝis kaj kial mi estas esperantisto»

Krome kulturvesperoj kun prelegoj pri arto, muziko, scienco k.t.p. kaj multe da kantado. Li ankaŭ proponis ke oni havu «proponkeston» kaj la membroj samopiniis pri tio.

La kunveno ĉifoje estis aranĝata kiel *Japana vespero*. Sigrid Dietrichson parolis pri «Travivaĵoj en Japanujo». Ŝi tre interese rakontis pri la diversaj lokoj kiujn ŝi vizitis, kaj pri siaj impresoj de la lando kaj popolo. Ŝi estas tre entuziasma pri la restado en la «Lando de la Sunleviĝo» kaj rekomendis al la klubanoj partopreni la UEA-kongreson venontjare.

Poste ni vidis enhavoplanan kolorfilmon pri Japanujo, kiu montris la diversajn lokojn menciitajn de Sigrid Dietrichson. La belegan filmon la klubo prunteprenis de la Japana Ambasadoro en Oslo. Harald Bowitz funkciigis la filmaparaton. Inter la eroj de la programo Tharald Dybing ludis japanan muzikon per sonbendo.

Por doni al la kunveno iometan japanan atmosferon la tabloj estis ornamitaj per «Ĉerizfloroj», sur la

muroj pendis japanaj bildoj, kaj kelkaj klubaninoj estis vestataj en kimonoj.

20/4. John Berggreen informis ke li ricevis respondon de la klubo en Malmö al sia demando rilate al eventuala komitato por la kunvenprogramoj. La respondo estis ke ili ne havas programkomitaton, sed diversajn aliajn komitatojn kaj 2 klubmastrojn kiuj asistas pri la programoj.

La prezidanto kunportis provizoran leterkeston, kaj li admotis la membrojn diligente uzi ĝin enmetonte siajn eventualajn sugestojn.

C. Støp-Bowitz informis ke kongresaj glumarkoj nun estas haveblaj je prezo de 80 oeroj po dek markoj.

La ĉefpunkto de la programo estis rakonto de s-ro Gunleik Bergrud pri «Kavalira skikuro de blinduloj». Li donis superrigardon pri la historio de la skikursoj por blinduloj kun la rezulto ke multaj blinduloj akiris skisignon. Inter alie li menciis ke la problemo por la blindaj skiantoj estas la balanco. Tre vigle li rakontis pri la lasta Kavalirkurado en kiu partoprenis ĉirkaŭ 150 personoj, inter ili proks. 50 blinduloj aŭ malakreviduloj. La skispuro estis 25 km. kaj iris trans Valdresflya al Beitostølen. Inter la ĉeestintoj kaj partoprenintoj estis la Reĝo, la Kronprinco, la ĉefministro kaj multaj aliaj eminentuloj, politikaj kaj sportaj. (Parenteze mi povas menci ke s-ro Gunleik Bergrud gajnis la klason por malakreviduloj. La tre interesa kaj pensoveka parolado rikoltis fortan kaj meritan aplaŭdon.

Sekvis 10-minuta Lingva Instruado en nova maniero. John Berggreen per 2 tabuloj kaj aliaj rekvizitoj instruis nin pri la akuzativo.

La Urso, Sarpsborg,

kunvenis 5/3. La prezidanto parolis pri sia vizito al Bergen. Tradukado

de la norvega en esperanton. Multe da diskutado ekestis plurfoje pro la diversaj nuanceblecoj kiujn havas Esperanto, kaj ankaŭ pro la speciala lingvo en la greka mitologio.

19/3. Bonvenigo al R. Kjønigsen kiu aperis post longedaŭra foresto kaŭze de krurrompiĝo. Siavice Kjønigsen dankis pro la ricevitaj floroj. La prezidanto admonis la klubanojn pruntepreni librojn de el la urba biblioteko kiu nun havas varian stokon da esperanto-literaturo.

2/4. La prez. montris prospekton pri Oslo eldonitan kun esperanta teksto. Sekvis informoj pri la kongresoj en Tokio kaj Haag. La asocio NEL estis sendinta al ni demandfoliojn. Unu el ili temas pri «La jaro de la internacia kunlaboro». Ni unuanime decidis kunlabori laŭeble. Daŭrigo de la atena programo.

Sauda Esperantoklubb.

La klubo kunvenis la 28/2 ĉe gesinjoroj Birkeli. Nia prez. bonvenigis la ĉeestantojn kaj «donis la vortojn» al la sekretario kiu laŭlegis la referaĵon pri la lasta kunveno.

Post la manĝado ni distris nin per divenkonkurso kaj laŭlegado de spritaĵoj esperantlingvaj.

«Mara Vento», Haugesund.

5/3. Ni parolis pri komuna vojaĝo al la UK en Hago kaj okazigo de distrikta jarkunveno en Skudeneshavn fine de majo. — Programulino estis f.ino Ingrid Myge, kiu vive kaj interese rakontis pri flug-vojaĝo al «la sankta lando» — suna kaj interekapta Izraelo. La plaĉan rakontadon ŝi akompanis per serio da belaj kaj karakterizaj kolor-lumbildoj. Bilde kaj vorte ŝi konigis al ni la hodiaŭan Izraelon, sed ankaŭ faris komparajn reirojn al la tempo kiam Jesuo Kristo

migradis sur izraela tero. Estis programpunkto tre ŝatata kaj f.ino Myge estis dankata per forta aplaŭdo.

La kunveno 2/4 estis aranĝita kiel «nederlanda vespero». Ni komencis bonvenigante la printempon per «Venis jam la tuta birdar»... La programon konsistigis du tre belaj kaj interesaj son- kaj kolorfilmoj pri Nederlando krom filmo nigra-blanka. Estis filmoj kun multifacetita enhavo kaj abundo da okulĝuaj koloroj — kaj en plaĉa maniero ili prezentis la naturon, popolvivon, la diversajn aktivecojn kaj ne malplej la fabelan flororiĉon de tiu eta, sed ĉarma lando.

Kunlige kun la programo pendis surmure grandaj, multkoloraj afiŝoj pri la kongres-lando.

La Esperantoklubo de Bergen

kunvenis 9/4. H. P. Lunder montris kolorlumbildojn pri norvegaj pejzaĵoj. Li vigle komentariis la bildojn.

La klubo ricevis salutsonrubandon de samideano en Antwerpen, kiun ni ĉiuj ĝuante aŭskultis. La belga samideano estas lerta kantisto, kaj eĉ pli lerta esperantparolanto, kiu fine petis la klubon respondi per sonrubando.

La sekr. riferis cirkuleron de NEL i. a. pri la admono de UEA koncerne la venonta jaro por internacia kunlaboro. Ni decidis aliĝi al tiu ĉi admono.

23/4. — Kjell Offerdal parolis pri sonetoj, kaj legis kelkajn de William Shakespeare, tradukitaj norveg- kaj esperantlingven. Marit Tvedt kantis anglajn kantojn, kaj s-ro Halvorsen piane akompanis.

Post kafpaŭzo ni per sonrubando aŭdis belgajn kaj hispanajn kantojn. Danegrupo kantis popolkantojn, kaj montris diversspecajn popoldancojn.

Grupo Esperantista de Trondheim

kunvenis 10/3. Kiel malferman kanton ni kantis n-ron 42 «Verdiĝas la

deklivoj». Post tio s.ino Johnsen rakontis pri vojaĝo al Germanujo kaj Aŭstrujo. Per tre belaj diapozitivaj ŝia edzo montris la grandiozajn montegojn en la Bavaraj kaj Tirolaj Alpoj speciale ĉirkaŭ Innsbruck k. Seefeld. Ni vidis ŝin surgrimpi tre altajn montopintojn, pasi preter grandaj glaciejoj, kaj ĝui la sunbrilon ekster la montkabanoj. La panoramoj de la montopintoj estis treege belaj. S-ino Johnsen vivante rakontis el la historio de Tirolo kaj menciis la pozicion kiun la nobelaro kaj la ekleziularo antaŭe posedis.

S-ro Houen diris kelkajn vortojn pri la jarkunveno de NEFA kaj la preparoj faritaj koncerne la kongreson en Hamar 1965.

17-a kongreso de IFEF

en Hamar 22.—28. majo 1965

NORVEGA MONDKONGRESO

eldonis glumarkojn

Nun estas haveblaj la glumarkoj por la 17a kongreso de IFEF en Hamar.

La markoj simboligas la kongresurban pere de desegnado de la katedralruinoj kaj malnova lokomotivo en Norvega Fervojmuzeo. La prezo estas por unu bloko, 50 ekzempleroj, 3,— kr., sed la blokoj konsistas el 10 strioj, kiuj enhavas po 5 markojn, kiuj do kostas kr. 0,30.

Vi povas mendi pere de poŝtmandato, aŭ vi povas kunsendi poŝtmarkojn samtempe kun la mendado.

UZU NIAJN GLUMARKOJN POR VIA KORESPONDADO!

Sendu la mendadon al

Odd Kolbrek
Kalbakkstubben 22
OSLO 9.

Deĵoradreso: Vogndriften, Lodalen, Oslo Ø.

teniso, ĉasado. Anthony Beard, Queen Street, Campbell Town, Tasmanio, Aŭstralio.

Korespondu!

Salutkartojn ni atendas el la tuta mondo pro nia letervespero, per kiuj la vivkapablecon kaj disvastiĝon de Esperanto ni deziras pruvi al la loĝantaro de nia urbo. Respondo garantiata. Adr.: Bénik Gyula, Kis u. 4. VAC. Hungarujo.

Dez. kor. per bele afrankitaj poŝtkartoj kun naciaj kostumoj. — S-ro Anonio Ciotta, Via Calla cratide 69, Agrigento, Italujo.

Dez. interŝanĝi bildkartojn. S-ino Vilma Voznicová, Zizkov-Kubelíkova 4, Praha 3, Ĉeĥoslovakio.

Juna esperantisto dez. aranĝi ekspozicion en Sofio, kaj bezonas p. m. kun esperanta temo, kaj ankaŭ dez. interŝ. p. m. S-ro Petrić, G, Delčev 8, Kiril Illebarov 11, Bulgarujo.

Dez. kor. S-ro Jiri Trbdík, Vlči Dul, Dobranov, Česká Lipa, Ĉeĥoslovakio.

33-jara kimro, edzo, dez. kor. kun norvego. Interesoj: poŝtmarkoj pri eminentuloj, interŝanĝo de ilustritaj gazetoj, literaturaj, ekonomiaj kaj politikaj temoj. Komprenas ankaŭ iom la norvegan lingvon. S-ro Dufydd Dafis, 13c Alfred St., Maesteg, Morgannwg, Wales, Britujo.

Pola studento dez. kor. kun norvegaj gesamideanoj, kaj interŝanĝi ilustritajn revuojn, bildkartojn, librojn kaj periodajn gazetojn, informojn pri la vivo en la lando, kaj poŝtmarkojn. Wiktor Gawronski, il. Kickiego 9/284, Warszawa 26, Polujo.

15-jara knabo dez. kor. kun samaĝuloj. — Interesoj: modeloj, legado, radio, biciklado, kampado, migrado, naĝado, atletiko, piedpilko, kriketo,

Naturfreunde Verein Deutschlands, s.ro Karl Heinz Kuhnt, Bauhüttenstr. 15, 28 Bremen 13, Germanujo, deziras kontakton kun norvegaj gejunuloj esperantistaj.

14-jara knabo dez. kor. kun samaĝaj geknaboj norvegaj. Martin Nietauer, Potštejn ĉ. 10, Ĉeĥoslovakujo.

17-jara pola junulo dez. kor. kun norvega junulino. Interesoj: muziko, teatro, bonaj libroj, kolektas poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn. — Tadeusz Graczykowski, ul. Staszica 7 m 5, Bydgoszcz, Pollando.

13-jara knabo deziras koresp. kun norvegaj gejunuloj. Interesoj: Usona historio, maŝindeseĝo, mapfarado, redaktado, vojaĝoj. — Rolf Richard Schmitt, 4800 Ellsworth Avenue 3, Pittsburgh 13, Pennsylvania, Usono.

Norsk Esperanto-Forbund (Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradrese: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

Esperantoforlaget A/s (Eldonejo Esperanto A/s)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradrese: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79

Ĉefdelegito de U. E. A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
C. E. Holters vei 7C, Sarpsborg: - Uzu tiun
adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.
Telefona: 54 727